MODERKOSTA LOĜADO!

Kroata Esperanto-Ligo (Loĝiga Servo), Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb.
Fakso: +385 1 4619373. Retpoŝto: <esperanto@zg.tel.hr>.

MODESTA SED BONKVALITA LOĜADO!

Ĝeneralaj kondiĉoj

La Loĝiga Servo de LKK disponas pri multaj litoj kaj ĉambroj por kongresanoj kaj grupoj kun pli modesta buĝeto. Tiujn loĝejojn necesas mendi kaj pagi rekte al Zagrebo (vidu la instrukciojn sube). Por povi mendi necesas esti kongresano, t.e. havi la kongresan numeron. Gvidantoj de grupoj bv. rekte kontakti la Loĝigan Servon de LKK. Gravegas mendi frue, ĝis la fino (31-a) de marto, ĉar la kapacitoj estas limigitaj kaj la limdatoj grave rolas ankaŭ por LKK.

La mendo fariĝas valida nur post la alveno de la pago. Se la pago ne venos ĝis (plej laste!) la 1-a de aprilo 2001, via mendo malvalidiĝos. Senkoste eblas malmendi ĝis la 1-a de majo. Por malmendoj faritaj ĝis la 1-a de junio oni perdos 25% de la pagita sumo, kaj por postaj mendoj inter 75% ĝis la tuta sumo.

Mendantoj akceptas ankaŭ hazardan kunloĝigon kun personoj de sama sekso, kaj LKK ne respondecas pri eventualaj malplaĉoj. Eblas eksplicite mendi kunloĝadon kun ne-fumanto, kvankam fumado en la loĝejoj ĝenerale ne estas permesata. La ejoj estas ofte de tre alta loĝkvalito kaj higiena nivelo, sed LKK ne povas respondeci pri eventuala malkontento en iu el la loĝejoj. La Loĝiga Servo povas (senkonsulte) loĝigi vin en alternativa kategorio kiun vi indikis.

Se vi ne indikis alternativojn, LKK povas elekti por vi la plej proksiman haveblan kategorion. Eventualan diferencon de prezo vi akceptas pagi, antaŭ, dum aŭ post la UK.

La loĝado en tiuj ĉi loĝejoj estas principe rezervita por la kongresa semajno (21-28 julio). Eblas mendi ankaŭ tranoktojn je unu ĝis tri tagoj, antaŭkongrese (18, 19, 20 julio) kaj postkongrese (28, 29, 30 julio), sed por tiuj tagoj validas aparta tarifo (vidu tabelon).

La loĝantoj akceptas la hejman regularon, kiu malpermesas damaĝi aŭ forigi la havaĵon de la loĝejoj (litaĵoj, mebloj k.s.) kaj devigas pretecon pagi la damaĝon se ĝi hazarde aperos. La loĝantoj mem eventuale asekuru sin kontraŭ tio, kaj kontraŭ eventuala malmendo ligita kun perdo de pago.

Post la ricevo de via pago la Loĝiga Servo konfirmos al vi la lokon plej laste unu monaton antaŭ la UK, sed laŭeble pli frue. Pri aliaj kondiĉoj de (mal)mendoj validas la difinoj de la Dua Bulteno kaj “Kondiĉoj de mendoj” presitaj dorsflanke de la mendilo aldonita al la Dua Bulteno: bv. nepre studi ilin. Ĉiuj prezoj estas en EUR. La unua dato estas la tago de la alveno, la lasta dato la tago de la foriro (ne la lasta tranokto antaŭ la forvojaĝo!).

En ĉiuj lokoj la litaĵoj kaj matenmanĝo estas inkluzivitaj.

Priskriboj de loĝejoj

L-1. Malmultekoste urbocentre. Loĝdomoj de Fervojista Teknika Lernejo (Učenički dom Željezničke tehničke škole, str. Palmotićeva 59). La loĝejo troviĝas proksime de ambaŭ kongresejoj (10-, respektive 20-minuta piedirado). Proksimaj publikaj garaĝoj en str. Petrinjska kaj Palmotićeva. La ĉambroj estas 4-, 6- kaj 8-litaj kun komunaj duŝejoj kaj koridoraj necesejoj. Mendantoj ne povas mem elekti tipon de ĉambro: la kunloĝigon faros la Loĝiga Servo. La nombro de lokoj estas limigita. *Prezo de la 7-taga tranoktado (21-28 julio) kun 7 matenmanĝoj: 89 EUR. Kosto de ekstraj noktoj (antaŭ kaj post la UK): po 14 EUR.*

L-2. Loĝhejmo Selska. (Učenički dom Selska, Selska c. 119). Malmultekosta loĝado ekster la urbocentro mem, de kie la kongresejoj estas facile atingeblaj per publika transporto. Trilitaj ĉambroj, komunaj duŝejoj. *Bv. noti: nur por gejunuloj (ĝis 30-jaraj)! Prezo: 109 EUR. Ekstraj noktoj: po 17 EUR.*

L-3. Moderpreza dulita ĉambro en studenta hejmo. (Studentski dom *Stjepan Radić / Sava*/). Temas pri dulitaj ĉambroj, komunaj duŝejoj kaj necesejoj, litaĵoj inkluzivitaj. Bona matenmanĝo kaj restoracio kun ebleco mendi aliajn manĝojn surloke. Ene de granda studenta urbeto apud la rivero, kun diskoteko, restoracioj, proksimaj sportejoj. Bonaj trafikaj ligoj al la kongresejoj. Aparte taŭga por grupoj sed ankaŭ por individuoj. *Speciala kongresa prezo: 132 EUR por la kongresa semajno. Ekstraj noktoj: po 20 EUR.*

L-4. Komforta, proksima al la kongresejo. (Studentski dom *Cvjetno naselje*). Tre komforta studenta loĝejo/somera hotelo de tristela nivelo. Je promendistanco de la kongresejoj (20 minutoj), kaj bone trafike ligita kun ili. Unu- kaj dulitaj ĉambroj kun propraj banejoj kaj necesejoj. Bona matenmanĝo kaj restoracio kun ebleco mendi aliajn manĝojn surloke. *Speciala kongresa prezo por la kongresa semajno: loko en unulita ĉambro, 237 EUR; en dulita, 169 EUR. Ekstraj noktoj: en unulita ĉambro, po 34 EUR; en dulita, po 25 EUR.*

L-5. Komforte/modestpreze/ekstercentre. (Učenički dom *Tin Ujević*, Av. Gojka Šuška 4). Iomete periferie lokita en nordorienta urboparto de Zagreb (Dubrava), sed kun tre bonaj trafikligoj al la urbocentro kaj la du kongresejoj. Temas pri alte komforta loĝejo, je la nivelo de tristela hotelo. La ĉambroj unu-, du- kaj trilitaj kun propraj duŝejoj kaj necesejoj. (Se elĉerpiĝos la dulitaj ĉambroj, oni loĝigos vin en trilitan.) Parklokoj apud la loĝejo. Rekomendata por aŭtomobilistoj kaj aŭtobusaj karavanoj. Je la dispono troviĝas malgranda trinkejo, video-klubo kaj sporta halo kun gimnastikejo. Lokoj limigitaj. *Kostoj de tranoktado dum sep tagoj kun inkluzivita abunda matenmanĝo: loko en unulita ĉambro, 189 EUR; en dulita, 165 EUR; en trilita, 154 EUR. Eblas mendi ĝis tri tranoktojn kaj antaŭ kaj post la kongreso: kosto de tranokto por unu nokto en unulita ĉambro, 30 EUR; en dulita, 25 EUR; en trilita, 20 EUR.*

Pagmanieroj

a) Per (poŝt)banko*: Hrvatska poštanska banka 250000-978-3256804 (Hrvatski savez za esperanto)*.

b) Per internacia poŝtmandato al la adreso de Kroata Esperanto-Ligo (vidu dekstre). *Ĉi-maniere bv. pagi 5 EUR malpli ol la mendosumo, pro evito de bankkostoj.*

MENDILO POR LOĜADO DUM LA 86-a UK ZAGREBO

Nomo: _____ **Adreso:** _____

_____

Lando: _____ **Kongresa numero:** _____ **UEA-kodo:** __ __ __ __ – __

Telefono: _____ **Fakso:** _____ **Retadreso:** _____

Naskiĝdato: _____ **Vegetarano:** jes / ne **Fumanto:** jes / ne **Sekso:** ino / viro

Mi legis, komprenas kaj akceptas la suprajn kondiĉojn kaj la (mal)mendokondiĉojn de la Dua Bulteno, kaj mendas jene, cirkligante la deziratajn kategoriojn:

Loĝejo	**1. Semajna prezo** 21-28 julio	**2. Ekstraj noktoj:** **1** 18/07 **4** 28/07 **2** 19/07 **5** 29/07 **3** 20/07 **6** 30/07	**3. Kvanto de ekstraj noktoj**	**4. Suma kosto de ekstraj noktoj**	**5. Kostoj entute: 1+4**
L-1 Fervojista	89 EUR	14 EUR	14 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
L-2 Selska	109 EUR	17 EUR	17 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
L-3 Sava	132 EUR	20 EUR	20 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
L-4 Cvjetno					
a/ 1-lita	236 EUR	34 EUR	34 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
b/ 2-lita	169 EUR	25 EUR	25 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
L-5 Tin Ujević					
a/ 1-lita	189 EUR	30 EUR	30 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
b/ 2-lita	165 EUR	25 EUR	25 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
c/ 3-lita	154 EUR	20 EUR	20 x ___ =	____ EUR	= ____ EUR
Datoj: Alveno:		Horo:		**Vojaĝmaniero:**	
Foriro:		Horo:			
Pagmaniero:	*Banko:* jes / ne | *Poŝtmandato:* **jes /** ne (se **jes**, bv. subtrahi 5 EUR sube)				
Sumo entute pagenda:	____ **EUR** Mi pagos plej laste ĝis la 30-a de marto 2001.				
Alternativoj: (se ne eblas via originala mendo)	*Bv. indiki la kodon de la loĝkategorioj:* 1.____ 2. _____ 3. ____ *Vi akceptas pagi eventualan prezdiferencon, se ne eblos plenumi vian originalan mendon sed loĝigos vin en alternativan kategorion.*				
Se restas iu ŝuldo mi pagos ĝin ĉe la alveno aŭ antaŭ la alveno al Zagrebo. Ekskursojn kaj aliajn aferojn mi eventuale mendos pere de la Centra Oficejo de UEA.					
Subskribo:		**Dato:**		**Loko:**	

Sendu kun pago al Kroata Esperanto-Ligo (Loĝiga Servo), Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio. *Bv. nepre konservi kopion de la mendilo por vi. Konservu kvitancojn de la pagoj kaj nepre kunprenu al Zagrebo la loĝkonfirmilon kiun vi ricevos en junio 2001.*

LKK kaj UEA deziras al vi agrablan vojaĝon, bonan restadon en Zagrebo kaj plezurplenan kongreson!

La Loĝiga Servo